



Kulturaj Kajeroj

TRIMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO
REVUE TRIMESTRIELLE DE CULTURE ET D'INFORMATION

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44000 NANTES, Francujo

J A R A B O N O :

P. BABIN

Jarabono : 60 fkoj

13, boulevard de la Chauvinière
44300 Nantes

P.C.K. Nantes : 2.813.61

(Vidu la liston de niaj perantoj sur pago 4)

1985 - 3

(JULIO - AUGUSTO - SEPTEMBRO)

EN TIU NUMERO

vi povos legi pri...



..tempo-pasigo en Villandry,



... LA DANCARTO
KIEL INTERNACIA ESPRIMILO.

(« La dancistino » de Degas)

KULTURAJ KAJEROJ

Trimonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

Jeannine Vincent, B.P. 54, 49150 Baugé.

Komitatanoj :

Pierre Babin

Simone Guillot

ENHAVO

	paĝo
El Grésillon	1
Esperanto tra la Mondo (Frangoul)	2
Kuraro (2) (S. Guillot)	3
Villandry (S. Boniol)	4-5
Aventuroj de Fifi stultul' (Mik)	5
La Dancarto (R. Watier)	6-7
Paĝo de la geknaboj (Gina)	8
Literaturaj Trezoroj (J.P. Danvy)	9
La reĝino kiu simpatias al Esp. (B. Golden)	10
La unua mensogo (L. Tihanyi)	11
Por via distro	12
La vie de Grésillon	13-14
Gramatiko per Bonhumoro (S. Guillot)	15

El Grésillon

En la ĉijara dua numero de Kulturaj Kajeroj ni insistis pri la neceso pliampleksigi la reklamon pri niaj programoj; ne pri la disvastigo de tiuj programoj, kiu estas sufiĉe kontentige prizorgata sed pri la enhavo de tiu reklamo. La proponitaj informoj estas tro ĝeneralaj, ne bone reliefigas la ĉiutagan vivon en la Esperanto-Domo, ankaŭ ne la diversaj servoj haveblaj dum iu restado. Ĝi ne bone reliefigas ankaŭ la kadron mem. Sed longa skriba informado tre ofte ne trafas la celon. Ni ĉiujare konstatas, ke eĉ la mallongajn indikojn donitajn sur la tarif-folio oni ne ĉiam legas. Ŝajnas, ke oni preteratentas la informojn, kiuj ne strikte respondas al la propraj zorgoj. Ni scias, ke multaj estas pretaj fari longan vojaĝon sed ŝatus havi precizajn indikojn pri "kio atendas ilin". La informpetoj, detalpetoj, kiujn ni ricevas skribe aŭ telefone estas tre diversaj ĉar la zorgoj estas tre diversaj. Certe kelkaj rezignas

la petojn ĉar ili ne sufiĉe bone regas esperanton, ankaŭ ne la francan, por klarigi siajn dezirojn.

La solvo eble dependas de niaj amikoj. Kial ne ekzistus, en ĉiu lando, unu aŭ du "Amikoj de Grésillon", kiu estus nia(j) peranto(j). Provizitaj per la necesaj informfolioj (ankaŭ pri la horaro de la vagonaroj!), riĉaj je personaj spertoj kaj travivaĵoj, ili certe povus utile helpi la samlandaj esperantistoj, kiuj intencas ĉeesti stuperiodon sed ŝatus scii, ĉu...

Ni ankaŭ aludis pri la turisma flanko de niaj aktivaĵoj. Pluraj el vi verŝajne aliĝas al iu grupo aŭ asocio, kiu de tempo al tempo organizas komunan viziton de iu regiono. Grésillon pretas akcepti tiajn grupojn inter Pasko kaj Junio kaj en septembro-oktobro. Ankaŭ Esp-grupoj povas organizi tian vojaĝon kun samfamilianoj kaj amikoj. Ni proponos al vi liston de vizitindaĵoj, eĉ tute pretajn vizitproponojn, kaj la akompanon de gvidanto. Ni jam akceptis grupojn eĉ el aliaj landoj.

Pensu, ke vi povas helpi nin en via lando mem. Petu informojn pri nia turisma servo.

Esperanto tra la Mondo

INTERNACIAJ KONGRESOJ EN GERMANIO

2.300 esperantistoj el 58 landoj kuniĝis en Aŭgsburgo por la 70-a Universala Kongreso. Pluraj diplomatoj salutis, el kiuj la ambasadoro de Ĉinio. La usona konsulo salutis en Esperanto.

Pli ol 400 partoprenantoj el 32 landoj sukcesigis la 41an Internacian Junularan kongreson en Eringefeld.

Ankaŭ en Aŭgsburgo la 6-a Ekumena kongreso arigis 143 kristanojn el 20 landoj kaj 148 personoj venis el 17 landoj por la 53-a Kongreso de Blindaj esperantistoj.

KIEN VI IROS ... EN 1986

Universala Kongreso en Bejing (Ĉinio), 26a de julio-2a de aŭgusto.

42a internacia Junulara Kongreso, Neurim (Israelo), 14-21a de aŭgusto.

10a Internacia Junulara Festivalo, dum Pasko, en Udine (Italio).

Kultura esperanto-Festivalo, 16-19 de majo en Uppsala (Svedio)

Franca Esperanto-Kongreso, 16-21 de majo en Gerardmer (Vosges).

Kongreso de SAT-Amikaro, 29-a de marto - 1-a de aprilo, en St Pierre de Chandieu apud Lyon. Informas: A. Nové, La lignière, 69360 St Symphorien d'Ozon.

NEPRE NE FORGESU

ke la 3-a Internacia Kanzon-Teatra Festivalo de Parizo okazos la 23an kaj 24an de novembro 1985. Respondeas: UFE, 4bis rue de la Cerisaie 75004 Paris. W. Auld deklamos lige kun baletoj de Claudio Tavares; Stefan Mac Gill, Georges Lagrange, J.P. Danvy kaj Hervé Gonin prezentos varieteaĵojn; Jak Le Puil kantas. Ankaŭ partoprenos la teatra grupo TESPA kaj la trupo de la Ruza Kruĉo.

EL SAN-MARINO

Esperanto estas la oficiala lingvo de la Akademio Internacia de Sciencoj de San Marino. La 2-a kaj 3-a sesioj okazos de la 27a de decembro ĝis la 6-a de januaro. Detalaj programoj: AIS, p.a. M.M. Michelotti, via Delfico 40, I-47031 San Marino.

SCIENCFIKCIO KAJ ESPERANTO

Harry Harrison, fama usona verkisto de sciencfikcio, aŭtoro de 33 romanoj tradukitaj en 21 lingvojn, estas konvinkita esperantisto. En siaj libroj li ofte aludas pri la internacia lingvo. En 1984 li parolis favore al Esperanto, en forumo, dum la monda kongreso de sciencfikcio.

OMAGE AL ZAMENHOF KAJ ESPERANTO

462 stratoj kaj monumentoj portas la nomojn "Zamenhof" aŭ "Esperanto" en 29 landoj. Espereble grandiĝos tiu nombro okaze de la centjara datreveno. La kunordiganto de tiu agado estas: H. Röllinger, Theresienst. 23, D-873 Bad Kissingen.

UNIVERSITATAJ SUKCESOJ

S-ino Marie-Thérèse Lloancy ricevis la noton "tre honorinda" por sia doktoriĝa disertacio pri la temo "Esperanto et jeux de mots dans l'oeuvre de Raymond Schwartz"

En Moskvo la konata esperantisto Boris Kolker doktoriĝis kun tezo pri "Kontribuo de la rusa lingvo al la formiĝo kaj evoluo de esperanto"

Nova sukceso de Detlev Blanke, en GDR, por dua tezo pri "Bazaj demandoj de la evoluo de planlingvoj, sub aparta konsidero de esperanto".

NOVAJ ELDONAĴOJ

"Li kaj ni; festlibro por la 80-a naskiĝtago de G. Waringhien", red. de R. Hauptenthal.

"Montara vilaĝo", romano de Chun-chan Yeh pri la vivo en ĉina vilaĝo dum la revoluciaj okazaĵoj de 1927.

"Ombro sur interna pejzaĝo", romano de Spomenka Štimec;

"Kaverno apud la maro" dek unu noveloj originale verkitaj de B. Potts.

"Du el", poezioj de Marjorie Boulton kaj Paul Thorsen.

"Iu instruisto, Celestin Freinet", 24paĝa informilo pri la pedagogiaj metodoj kaj la vivo de Freinet.

"Veselin Damjanov koncertas en Kanado" nova kasedo.

"Bukedo de la hungara poezio", 44 poemoj deklamitaj de 12 elstaraj hungaraj geaktoroj.

KURARO...

...kaj la moderna scienco-

Jam en 1781, pastro Pietro Maltonato la unua indikis la efikon de kuraro sur la muskoloj. Sed Claude Bernard kaj liaj studentoj enirigas la kuraron en la historion de la moderna scienco. C. Bernard eksperimentis sur bestoj en la Franca Kolegio. En 1850 li konkludas: "La kuraro neniigas la efikon de la nervoj sur la muskoloj". Kölliker kaj en 1870 Vulpian atingas saman konkludon. La eksperimentoj montras, ke ĝenerala laceco kaptas la kurarigitan beston. La muskoloj iom post iom paraliziĝas, unue tiuj de la nuko kaj kolo, poste tiuj de la membroj; kiam torako kaj diafragmo paraliziĝas, la spirado ĉesas: la morto okazas pro asfiksio. Tamen la kora muskolo rezistas pli longtempe, kelkajn minutojn ĉe birdo, kelkajn horojn ĉe batrako kaj reptilio, tri tagojn ĉe testudo. Krome, oni rimarkis, ke la urino abunde drenas la kuraron eksteren. Necesis lukti kontraŭ asfiksio por gardi la vunditon viva... ĝis resaniĝo. Angla bestkuracisto imagis la unuan artefaritan spiradon. Li uzis la kuraron por lukti kontraŭ la tetano de la ĉevaloj. Li diris: "Paralizante la muskolojn, la kuraro neniigas la nervan eksciton okazigitan de la tetano". Por lukti kontraŭ asfiksio li uzis ordinaran blovilon por enblovi aeron en la pulmojn de la ĉevaloj; jen la praulo de niaj modernaj revivigaj aparatoj. Tamen trideko da jaroj estis necesaj, post la laboro de C. Bernard, por precizigi, kiel nervoj kaj muskoloj kuniĝas. Hodiaŭ la elektronika mikroskopo montras la lezojn okazigitajn de la kuraro ĉe la nervaj finaĵoj, tie kie la nervoj atingas la muskolojn. Dum pli ol 30 jaroj, oni provis uzi kuraron en la kuracado de la konvulsiaj statoj kaj de la tetano. Sed tro fruaj estis tiuj provoj: oni ne sukcesis. Jam en 1864 C. Bernard notis: "La kuraroj, egale kun multaj aliaj energiaj venenoj, certe eniros en la kampon de la medicino, sed, tiucele, estas necese scii ekzakte ilian konsiston".

Oni devis forlasi la indiĝenajn kurarojn tro malpurajn kaj tro

diversajn. En 1828 Boussingault kaj Roulin efektivas la unuajn analizo-provojn. En 1897 von Boehm izolas la kuzarin-on, forte ageman, kaj la kurin-on, kristaligitan alkaloidon. En 1935 estas starigita la formulon de la tubokurino, kiu alportas al kuracistoj kaj kirurgoj facile uzeblan produkton. En 1946 oni ekstraktas alkaloidojn aŭ de la kuraro mem aŭ de la plantoj, kiujn la indiĝenoj uzas por ĝin prepari. Fine Fineau kaj Bovet preparas, ĉe Pasteur Instituto, sintezajn produktojn kurarigajn, laŭ la kemia formulo de la kuraro eltirita el la "Chondodendron". Tiel junigita la kuraro prenas lokon pli kaj pli gravan en medicino kaj kirurgio. Oni ellaboris du grupojn da kuraroj: la "Fleksedil", kies naskiĝo markas gravan daton; ĝi estas blanka pulvoro, iom amara, tre solvebla en akvo aŭ en alkoholo; ĝi forte agas kaj dum longa tempo. La "Leptokuraro" por mallonga malstreĉiĝo de la muskoloj; ĝi estas rapide eliminata de la urino; ĝi estas helpanto multvalora por mallonga operacio. En Kanado en 1942 unufoje estis uzata kuraro, kiel komplemento de la anestezo. De tiam kuraro eniris en la kirurgiajn intervenojn. Por senmovigi: torakon dum operacio ĉe koro aŭ pulmo; tiuokaze oni uzas artefaritan spiradon; abdomenon por operacii intestojn, galon, por ekzameni rektumon, vezikon; kolon por interveni ĉe laringo, gloto, faringo. En ortopedio, kuraro, kiu senmovigas la muskolojn, igas pli facilaj la enartikigon ĉe elartikiĝoj kaj frakturoj. En oftalmologio ĝi okazigas la malstreĉiĝon de la ekstera muskolo de la okulo. Okaze de elektroŝoko ĝi preventas la traŭmojn. Ĉe tetano kaj toksadoj kaŭzitaj de striknino la kuraro ne efikas sur la profunda kaŭzo de la malsano sed ĝi malpliigas la trismon; malpliigante la konvulsiajn krizojn de la malsanulo, ĝi malpliigas la suferojn. Post kinino, kokaino, kakao, mateo, terpomo, fazeolo, citrono kaj multaj aliaj plantoj jen la kuraro importita el Ameriko.

S. GUILLOT

Villandry.

DEIRPUNKTO POR REVADO.

(FINO)

Kiel oni pasigas la tempon, kiam oni estas kune ? Oni kantas, muzikas, ludas. Sed la plej grava afero estas la konversacia arto. Ĉar malfacila artofako ĝi vere estas, por kiu reguloj ne estas vortigitaj, krom observado de konveno kaj deco. Scipovi paroli pri ĉio ajn en plaĉa maniero, vekante interesiĝon: jen la tuto. La plej ŝatata temo estas literaturaĵoj. La aŭtoroj submetas siajn verkojn al recenzado. Corneille prezentas siajn teatraĵojn, Voiture siajn leterojn. Oni rimadas versopeĉojn. La kutimuloj kune kun Montausier prilaboras la Girlandon de Julia, kiun ŝi omaĝe ricevos okaze de sia festotago. Oni proponas temon al sonetverkistoj. Du lertuloj konkuras kaj triulo arbitracias per tria de li farita soneto. Se ni estus sur la loko de Julia ni furioze sciavidus pri la terure malkomunaj belaĵoj en la Girlando entenataj. Per kiaj floroj la amsopir-emuloj plektis la senkompare delikatan amĉenon ? Nu, madrigaloj konsistigas tiun bukedon de "floroj en la parnasa ĝardeno malvolviĝintaj": rozo, narciso, violo, papavo, kaj... kalendulo (ĉar devas esti klarigite, ke franclingve tiu flornomo akceptas ankaŭ la signifon de "zorgo", el kio fontas senfinaj vortludoj).

Ĉe la markizino Voiture sentas sin bone kaj feliĉe spite lian nenobelan devenon. Li korespondadas kun la hotelgastoj, precipe kun la markizino mem kaj Julia. Lin spronas la taksado de la mondumanoj, kiuj estas liajn leterojn komentontaj; li eminentas en versfarado, lerte turnas galantaĵon, lokas la pintumon ĝuste tien, kie ĝi efektoj. Krome li scipovas perletere ekplaĉi, elmontri spritemon kaj mildan gajemon. Ofte lin trafas la senmalicaj ŝercoj de la rondanoj kaj li uzas la laŭmodan ĵargonon por ĉikani kaj plendi pri siaj malplezuretoj. Sed ni ne forgesu, ke La Fontaine, omaĝante al li per la titolo "Majstro Vincent", lin levis samŝtupen, kiel Majstro Francisko (Rabelais) kaj Majstro Clément (Marot).

Jes, post la potence elvokivaj amkvadratoj, jen la "Girlando" kaj ĝiaj aminklinaj rozoj kaj zorgohavaj kalenduloj. Kaj se unu plian jarcenton ni superflugos kaj haltos dum la jaro 1722-a, niajn orelojn karesos ĉi-foje ne amversaĵoj, sed ammuzikaĵoj. Ĉar ĝuste tiujare Francisko Couperin "la Granda" laŭ alnomo, publikigas sian trian libron de klavicenaj pecoj. El ĝi ni eltiru la "dek-trian ordon". Sed kion signifas "ordo" ? Tion klarigas la aŭtoro mem: "Ĉi tio ja ne estas suito, kvankam ĝi entenas neprajn dancopecojn. Ordon vi deziras, ĉu ne ? Jen do ordo; kaj "malordo" oni povus egale ĝin titoli".

Unua peco: "la ekflorantaj lilioj". Ĉe Couperin, urboloĝanto, la sento pri naturbelaĵoj ne estas rekta emocio, sed nur duagrada: la naturo estas perceptata trae de kultura heredaĵo. En lia sentokapablo, ekfloranta lilio iel kunfandiĝas kun la bildo de ekfloranta knabino kaj ambaŭ bildoj kvazaŭ supermetiĝas. Kaj simile okazas kun la dua peco: "la kanoj", kiuj simbolas ĉion fleksiĝeman, kurbiĝeman. Kvankam sinceras la emociemo de la komponisto, en lian penson kaj muzikverkon ne la aĵoj mem sed ties rebriloj enviciĝas. Kaj tiajn duflankecon kaj duangradecon ni jam ekkaptis en la precioza sent- kaj esprimmaniero.

Se ni plu trafolumos la partituron ni trafos la tiel-nomatajn "folies françaises". Kaj tie kuŝas lingva malfacilaĵo. Tiu substantivo "folies" (vortvorte: frenezaĵoj) foje estas erare tradukita per "frivolaĵoj" aŭ "bagatelaĵoj". Fakte tiuj "folies" devenas de popolfestoj en Portugalio kaj ĉefe Hispanio, kiuj estis okazoj por surstrata dancado laŭ tipaj ritmoj. Furoris ne nur dancado, sed maskerado kaj maskovestitoj sin amuzis sub gitarakompanado kaj muzikimprovizado. Tutan Eŭropon ekinvasas tiu furoro, kun tamen iom-post-ioma kvietiĝo kaj malpli da impeta eksplodemo. La ĉi-rilataj muziktemoj iĝas veraj gurditaĵoj ĉe la publiko, dum ĉe la muzikistoj ili konsistigas esprimrimedon - laŭ nia nuntaga ĵargono ni emus diri, ke la barokaj muzikistoj ilin uzadis, kiel helpilon por liveri sian mesaĝon.

El tuta ĝeno da temvariado konsistas tiu parto de la 13-a ordo, kun aldone anekdota flanko. Akorde kun la tiama franca gusto, sugestopovaj bildoj elvokas personigon de submaske ludantaj sentoj. Jen la bildokolekto listigita de Couperin:

- la virgeco sub la domeno kun koloro de nevideblo;
- la pudoro sub la domeno kun la koloro de rozo;
- la ardeco sub la karnokolora domeno;
- la espero sub la verda domeno;
- la langvoro sub la violkolora domeno;
- la koketeco sub diverskoloraj domenoj;
- la oldaj galantuloj kaj kadukiĝantaj monhavulinoj sub la domenoj purpuraj kaj velkfoli-koloraj;
- la naivaj kokoj sub la flavaj domenoj;
- la enfermiĝema ĵaluzo sub la domeno maŭngriza;
- la furiozeco aŭ malespero sub la nigra domeno.

("Naivaj kokoj" estas malkruda sinonimo por "kokritoj". La franca birda simboliko ne estas la sama. La franclingva emblemo de trompiteco estas la "kukolo".)

Fakte tiaj muzikpecoj kreas apartan ĝenron: sur ia loko inter vera vivo, maskobalo kaj teatro situantaj, ili estas konceptitaj, kiel karakter- kaj sentodramoj, mildaj fantaziaĵoj, emocikapricoj; kaj sur la nedefinita scenejo, kie ili disvolviĝas, nur gravas la amafero. Ĉiuj sinsekvaj strofoj alprenas kvazaŭan lingvokodon por ludi rolon en iaspeca pormaska teatraĵo. Pro tio la famkonataj "ornamaĵoj" ne estas ĉi tie kromaĵoj, sed veraj esprimiloj.

En la lasta peco: "l'animo en ĉagreno", la langorado superas la mildajn langvorojn XVII-jarcentajn. Tion ilustras jena frazo de Saint-Evremond: "Langvori estas la plej bela amomovo. Ĝi estas la delikata rezulto de pura flamo nin konsumanta. Ĝi estas korkara kaj milda malsano, pro kiu ni malamas la personon pri nia resaniĝo".

De la floroj al la vortoj, de la vortoj al la notoj ni povus senfine zigzagi. Konkludo neblas. Sed, kvazaŭ fermaton, mi proponos, en venonta numero de Kulturaj Kajeroj, kelkajn tradukaĵojn el tiaj poetoj.

S. BONIOL

LA AVENTUROJ DE FIFI STULTUL



pri

dancarto

Baletoj aŭ scenejaj ĥordancoj estis antaŭ nelonge konsiderataj de mezkleraj personoj kiel rafinita distraĵo de estetikemuloj aŭ riĉuloj. Unufoje en sia vivo oni iris spekti konatan baleton ĉe la Nacia opero, kaj sufiĉe! Ni nun vidos, kiel progresive la sceneja dancarto fariĝis pli kaj pli internacia kaj ŝatata.

De praaj tempoj dancado estis kolektiva festa ago sed ĉefe folklora por ĉiu tribo, regiono aŭ landeto. Ekzemple la "Sardano" estas ankoraŭ nuntempe tipa de Katalunio; oni konas aliajn en provincoj de Francujo aŭ eksterlande. La ŝanĝiĝo de popola danco al ĥora spektaklo datumas de la 14-a jarcento, aperinta en Italio kaj de tie komenciĝis migrado de lertaj gedancistoj kunportintaj sian arton de lando al lando. En Firenzo kaj aliaj italaj urboj baletoj ricevis protektadon de grand'sinjoroj ĉe kortegaj palacoj. Brilaj kaj okulfrapaj estis la kostumoj por dancado, eĉ, laŭdire, Leonardo de Vinci desegnis kelkajn. El Milano baletoj elmigris al kortegoj de Bavarujo kaj Polujo. Francaj reĝoj, nome Henriko la Tria kaj poste Ludoviko la Dekkvara venigis en sian palacon de Parizo kaj Versailles italajn lertulojn pri dancarto. Tiuj kortegaj spektakloj ĉefe inspiriĝis de la tiama modo pri Renesanca stilo, uzantaj mitologiajn temojn de antikva Greklando, Muzoj, satiroj, najadoj, Dioj Merkurio kaj Venuzia evoluis sur la scenejo. Dum festoj la nobeloj kaj la reĝo mem ceremonie dancis laŭ muziko malrapida aŭ peza. Ludoviko la Dekkvara ŝategis la dancadon, kiun li praktikis ĝis li estis kvardekjara; li ankaŭ protektis aŭtorojn de baletoj laŭ la muziko de Lulli. Ankoraŭ en nia tempola "Nobela Burĝo" de Molière estas ludata kun intermezo de baletoj ĉe la Pariza Nacia Komedio.

Sed, progresive, de festsalonegoj, kie la korteganoj dancis pli malpli

lerte, la dancarto elmigris al scenejoj de teatroj kun profesiaj artistoj. Vasta disvolviĝo de la dancarto okazis dum la 17-a jarcento dank'al pli kaj pli lertaj gedancistoj ankaŭ pro la perfektigo de la muziko, ekzemple de Glück kaj Mozart. Komenciĝis pli intensa migrado inter landoj de famaj dancroluloj. Novere, el svisa deveno (naskiĝis en 1727) vojaĝis, kiel baletmajstro de ĉefurbo al ĉefurbo: Parizo, Berlino, Londono, k.t.p... Renkonto de francoj kaj italoj okazis en Sankta-Petersburgo, aliaj gedancistoj famiĝis en Milano, Venezio aŭ Vieno.

Oni rimarkos, kiel malfacile estas nun ricevi ĝustan ideon pri la scenejaj ĥordancoj en la pasinteco. Danco estas momenta kreitaĵo malfacile fiksebla. Oni posedas en arĥivoj desegnaĵojn kaj gravuraĵojn de figuraj aktoroj en scenkostumoj aŭ pri scenejaj dekoracioj. Kelkaj aŭtoroj imagis notsistemon de la dancarto, certe ne kompletan. Fiksado por la estonto de arto, kies esenco estas esprimo per la graciaj movoj kaj ritma sinteno de la homa korpo ne estis vere ebla ĝis nia epoko kun kino kaj registro de televido. Tial en sinsekvaj prezentoj de iu baleto, laŭ la landoj kaj dancomajstroj, la spektaklo ŝanĝiĝis. Nur la muziko, tute notebla, restis la sama. Ni ne povas detale priskribi la evoluon de baletoj tra la 19-a jarcento. Iu recenzo de titoloj de baletoj ĝis la nuna tempo sumas ĉirkaŭ 700 ludaĵojn. La muziko de baletoj estis foje verkoj de nekonataj aŭtoroj, foje de plej famaj komponistoj, de Beethoven ĝis Wagner. Iuj baletoj, kelkfoje luditaj, perdiĝis en forgeso, dum aliaj eĉ malnovaj revenas de tempo al tempo sur la scenejojn. Ankaŭ la formo, la esprimmaniero, ŝanĝiĝis tra la tempo. Dum la regno de Ludoviko la Dekkvara oni kantis aŭ deklamis dancante. Ek de la 18-a jarcento kaj ĉefe en la 19-a jarcento, la baleto baziĝis sur literatura rakonto aŭ legendo kaj nur pantomimo.

Ĉi tie ni citos KOPELIA, entute pantomimo triakta, kreita en Parizo en 1870 sur temo de Hoffman" la filino kun emajlaj okuloj", kun bonega, eleganta muziko de la franco Leo Delibe, dancverkado de Saint-

Leon. Dank'al ĝia pitoreska lerteco en la muzika komponado, tiu verko restis kun internacia famo. Same estas GISELLE (Ĵizel) laŭ romantika rakonto de la franco Théophile Gautier en du aktoj kun muziko de Adam, speciale komponita en adapto al danco, la unua estas pantomimo, la dua estas feaĵo, blanka baletto. Ni ne povas ne citi La LAGO de l'CIGNOJ, pantomimo kvarakta, laŭ Bigitchev kaj Gelzer, kie bela princo enamiĝas je belulino, kiun malbela sorĉisto ŝanĝas je blanka cigno, kaj la kompatinda princo mortas en la ondoj de la lago pro la malbeno de la sorĉisto. Oni konstata, ke tiam oni ne timis pro malfacilo de enscenigo! Sed ĉio estas savita pro la ekstreme bela muziko de Tchaikovski, foje pompa, foje esprimoplena kaj eleganta, kiun oni ludas en la tuta mondo. La dancverkado de tiu lasta baletto estis farita de Marius Petipa. Naskita en Marseille en 1822, Marius Petipa, jam famiĝinta pro lerteco en dancado, migrinta de Francujo al Novjorko revenis al Parizo. Tie, en la Pariza Opero li ricevis iam leteron laŭ kiu la Direktoro de la Imperia Rusa Teatro proponis al li dungadon, kiel "steldancisto" kun bonega salajro. Tuj Petipa Forvojaĝis al Petersburgo, kie li renkontis la francan dancmajstron Perrot. Poste Petipa fariĝis dancprofesoro en la Imperia Lernejo kaj li disvolvis longan karieron en la rusa dancarto, kiu pli kaj pli famiĝis dank'al la lerteco de la mondkonataj rusaj komponistoj. En aliaj landoj vasta ĉerpado okazis por subteni la dancarton. Kontribuis Debussy, Richard Strauss, Ravel, k.t.p.... Brilis en nia epoko la dancistoj Serge Diaghilev, Lifar; ankaŭ la markizo de Cuevas... En Francujo nuntempe tre konataj estas Roland Petit en la Opero de Marseille, kaj Maurice Béjart, kreinto de la baletoj de la 20-a jarcento, komence en Bruselo kaj nun en Parizo.

Laŭ moderna tendenco, kvankam oni daŭre ludas iamajn pantomimojn, oni iras al pli abstrakta rolludado sen sceneja dekoracio. Ekzerciĝas lerteco de la danco sur muziko de Jean-Sebastien Bach aŭ de Haendel,

ne ĉiam tre komprenebla por ĉiu homo. Sed verkaĵo de la dancmajstro Roland Petit, "Amindumoj de Franz Schubert", diskrete mima, ĉarmis per fono de scenejo delikate pentrita, eksterordinaraj dancistoj kaj sinsekvo de bone elektitaj muzikaĵoj de la fama komponisto. Tiu baletto rondiras la mondon.

Dancarto estas certe la plej malfacila sed altgrada arto, festante la graciecon de la juna homa korpo. Anstataŭ restadi sur grandaj scenejoj, nun la ĥordancado eniras ĉiun domo tra la televido, fariĝante multkonata, ŝatata esprimilo internacia.

René WATIER

GRAVE!

Ĉiujare la FONDUSO BELBONA ESPERO donas subvenciojn al junaj esperantistoj, ne francaj, kiuj deziras ĉeesti programon someran en la Kulturdomo Grésillon.

Kandidatoj skribu al:

Fonduso Belbona Espero
Esperanto-Domo Grésillon
F-49150 BAUGE



La tuta familio legas nian revuon
KULTURAJ KAJEROJ
(listo de la perantoj sur la lasta kovril-paĝo)

PAĈO DE LA GEKNABOJ

ELSELIGITA!

Iam mi rajdadis ĉevalon. Dum tri jaroj mi rajdis ĉevalon por viziti lernejon. Dek kilometrojn ĉiutage. La ĉevalo estis bruna. Ĝi nomiĝis Bobs (elp. 'bobz'). Iun tagon Bobs galopetis kviete, kaj ni jam estis surkampe, kaj alproksimiĝantaj al la hejmo, kiam kuniklo saltetis de sub arbeto, apud la piedoj de Bobs.

Bobs eksaltegis.

Ĝi saltegis antaŭen kaj tuj ekgalopis.

Ĝi lasis min malantaŭe.

Miaj ŝultroj frapegis la teron kaj mi vidis stelojn: jes, vere! Mi vidis stelojn je la 4-a posttagmeze.

Bobs galopis trans monteton.





Mi stariĝis kaj marŝis poste. Estis barilo proksime; tie la besto devis halti.

Paĉjo, kiu laboris sur apuda kampo, vidis ĝin kaj rapidis kapti ĝin.

Mia kapo doloretis tiam, sed neniam plu elseligis min Bobs.

Salutojn !

Onklino Ĝina, en Aŭstralio.



VENTRO MALSATA

ORELON NE HAVAS.

PRI NIAJ LITERATURAJ

TREZOROJ

Nu... kiuj atente legis la unuajn artikolojn de tiu ĉi rubriko, tiuj scias, ke pri ĝi respondecas direktoro de aliĝenna gazeto. Kiam tiu ulo devas nepre zorgi pri aranĝado de etaĝo en sia kampardomo (tipe direktora okupo!), la kompatindaj kunlaborantoj kutime heredas kromajn taskojn. Tiel okazas, kaj mi provu nun paroleti pri poeto, lasante sufiĉan tempon al mia atestimata direktoro por vorlegi kaj digesti kelkajn pliajn romanojn por estontaj artikoloj...

Mi jam pritraktis la verkojn de la "patro de la esperanto-poezio" (vd KK 84/4), kiu unue publikigis poemojn en Esperanto (krom LLZ evidente). Laŭ publicisto, ne li unue komencis verki en E-o, sed iu alia, pri kiu mi nun parolos.

Zamenhof naskiĝis en Bjalistok la 6-an de novembro 1868, esperantiĝis en Julio 1887 (li tiam estis 18jaraĝa, kio estas tre kutima faro), kaj mortis en Varsovio la 4-an de decembro 1933. Ĉar samnomulo jam famis en la esperantovicoj, li elektis la pseŭdonimon de "Ĉapo el ruĝa aŭ blanka drapo, kun pendanta kvasto, en formo de renversita florpoto" (PIV), t.e. Fez. Pli serioze ni menciuj, ke temas fakte pri FE kiel Felikso, kaj Z kiel... (kiuj respondis Zorhof, tiujn mi gratulas: ili legas la Kancerklinikon!). Sed "florpotformulo" estas ja bela pseŭdonimo!

Plej gravas liaj poemoj. Ni kompren-eble ne atentis la strofojn "esperanto-ozajn" (dankon Ĝuljo por tiu trafa esprimo) neprajn por niaj fruaj verkistoj, kaj plene konsentis kun la unua eldono de Esperanto-Antologio (kio? Kelkaj ne jam aĉetis la duan ?), kiam ĝi enĉapitrigas lin sub la titolon "Primitiva Romantismo". Ekzemple, en "Homa Doloro" (la sola poemo eldonita apartlibre), malriĉa knabo savas la filinon de sia bonfarulino, kaj edziĝas kun ŝi (la filino kompren-eble. Cetere, la patrino mortis intertempe). tre praromantisma, kaj laŭ mi sukcesa, estas "Legendo":

..De l'tur', kies ombro plej ŝirmas
reĝdomon

Kaj kie juĝeja flag' pendis,
La reĝa kapric' ĉiunokte la homon
En faŭkon riveran mortsendis..."

Sed mi ja povus citi multajn aliajn poemojn, kiel "Vana Ofero" (rememoroj de turka veterano), aŭ la "Vizito de la steloj sur la tero".

Apud tiuj romantismaj poemoj troviĝas aliaj pli faciltonaj (ekz-e: Jam venas Maj', printempo ĉarma, / Viviĝas dorma kor', esper', / Sub suna bril' venteto ĉarma / Alportas vivon al la ter'.) Ni menciuj "Versaĵo sen fino" (1892) nur pro la fakto, ke ĝin muzikigis Jak Le Puil, kaj ke ĝi aperos (teorie post malmulte da monatoj) en lia tria kasedo (provizora titolo: De Pont-Aven al Varsovi'; senpaga reklamo, sed mi kunkulpas!)

(Interparenteze, jen persona rememoro. Kiel, nova esperantisto, mi deĵoris ĉe budo okaze de festo, kaj tiam mi aŭdis trafan argumenton por nia lingvo. Iu, kun boteleto enmana, proksimiĝis de la budo, kaj laŭte deklaris: "Sed via lingvo estas artefarita!". Lerte iu esperantisto (ve! nun mortinta!) replikis: "Sed, kia do estas via vino?". Pri tio mi klare memoras ĉar ne ĉiuj esperantistoj kuraĝus esti tiel humurplenaj... Tamen, min surprizis apenaŭ pli poste poemo de Fez: "En vino estas vero. Romanoj nin instruis. / Sendube ĉar praavoj la vinon veran ĝuis. / Ni tamen, bedaŭrinde, ne povas diri tiel. / Ĉar nia vino - vera estas neniel.

Ni profitu la okazon esti interparenteze por demandi ĉu estas psikanalizisto inter la legantaro. Jam de la unuaj poemoj preskaŭ ĉiuj heroinoj de Fez nomiĝas Heleno. Kaj, en la jaro 1900, Fez edziĝis kun iu Heleno! Studenda!

Malpli interesaj estas liaj noveloj, ofte naivegaj. Tio pravigus la aventurojn de Fez kaj Kabe verkitajn de K. Long, kaj aperintajn dise tra la esperanto-gazetaro. Liaj artikoloj estas tute esperantozaj (infekto nomiĝas "Morbus Esperantitis"), sed okaze de librotago li verkis frazon per kiu mi finos: "Se nur unu libron prenos ĉiu, En la librotago orfos neniu".

J.P.DANVY

LA REĜINO, kiu simpatiis al esperanto

Sur bildpaĝo R/11 de Enciklopedio de Esperanto aperas faksimilo de propramana dediĉo por Esperanto en la rumana lingvo. La subskribinto estas Elisabeth. Kiu estis tiu virino, kaj kial ŝi meritis mencion en tiu grava Esperanta konsultlibro, Bedaŭrinde, Enciklopedio de Esperanto, kaŝas pliajn informojn, do oni devas esplori aliloke la historion de la Esperanto-movado en Rumanio.

Unu el la plej elstaraj Elizabetaj el Rumanio estis reĝino de germana deveno. Ŝi estis filino de Princo Hermann de Wied kaj naskiĝis en 1843 en Neuwied, Germanio. En 1869 ŝi edziniĝis al Princo Karlo Hohencollerno, kaj kiam en 1881 tiu ĉi fariĝis la reĝo de Rumanio, Elizabeta estis kronita reĝino.

Reĝino Elizabeta preferis okupiĝi pri la beletristiko sub la pseŭdonimo Carmen Sylva. En 1880 aperis ŝia traduko en la germanan lingvon de rumaraj poemoj. Du jarojn poste estis eldonita "Pensoj de Reĝino", verkita en la franca. Krom propraj versaĵoj, venis el ŝia plumo ankaŭ distraj romanoj kaj verkoj kun naciaj popolaj legendoj kaj kantoj. Karakterizas ŝiajn prozon kaj poezion novromantika impresionisma stilo; enhance ili priskribas la rumanaĵn pejzaĝon kaj kutimojn. Ŝia lasta literatura verko, "Leteroj de Soleca Reĝino", aperis en 1916, en la jaro de ŝia morto.

Etnolingvaj enciklopedioj silentas pri ŝia poresperanta agado, sed citaĵo en "Pri Internacia Lingvo dum Jarcentoj" de Isaj Dratwer, informas, ke Carmen Sylva subtenis la Esperanto-movadon en Rumanio kaj ŝi precipe interesiĝis pri la disvastigo de la internacia lingvo inter blinduloj. Konsultante la artikolon "Blinduloj" en Enciklopedio de Esperanto, oni ekscias, ke la rumana reĝino respondis favore al la petskribo de Prof. Théophile Cart, sendita al ĉiuj reĝinoj en Eŭropo por akiri apogon kaj financon helpon, celantan la instruadon

de Esperanto al blinduloj. Carmen Sylva estis la fondinto kaj patrono de Vatra Luminoasă, la rumana blindula instituto en Bukareŝto. Tie gvidis Esperanto-kursojn D-ro Gabrielo Robin, bakteriologo, kiu lernis la brajlan skribmanieron por plenumi tiun taskon.

La rumana reĝino akceptis ankaŭ la protektadon de la Rumana Esperanto-Societo kaj en 1909 ŝi donis al tiu organizaĵo la ekskluzivan tradukrajton por siaj verkoj en esperanton. Ŝajnas, ke nur du el ŝiaj verkoj estis esperantigitaj. En 1909 estis eldonita "La vizio de la poeto" (Urbo por la geblinduloj), kiun Kazimir Eŭcharis tradukis el la angla. La germana poemo "Sufero" estis esperantigita de Siegfried Lederer kaj publikigita en 1911 kune kun versioj en aliaj lingvoj.

Kvankam kelkloke estas asertite, ke Carmen Sylva mem eklernis Esperanton, ne ekzistas dokumentita pruvo pri tio; do anstataŭ nomi ŝin esperantisto, estas preferinde diri, ke ŝi estis simpatianto al Esperanto. Estas dirite ankaŭ, ke Zamenhof posedis ŝian portreton, havantan la ĉi-supre menciitan dediĉon. Li akiris ĝin dum la 8-Universala Kongreso, kiu okazis en Krakovo, Pollando, en 1912. S-ro Prezenti Levy, blindulo kaj delegito de la rumana esperantistaro, oficiale transdonis la portreton, kiun ŝia reĝina moŝto donacis al la aŭtoro de Esperanto, kaj la kongreso sendis telegramon dankantan Carmen Sylva pro ŝia afablaĵo kaj simpatio al Esperanto. La rumalingva dediĉo indikas, ke la reĝino ankoraŭ ne sciis Esperanton; se ŝi estus lerninta la Internacian Lingvon, kial ŝi ne skribus sian dediĉon en Esperanto?

Bernard Golden

LA UNUA

La patrino de Roseta estis granda, dika virino volonte fanfaronema. Al ĉiu ŝi rakontis kiel bone ŝi edukis sian filinon. Roseta neniam mensogas. Eĉ en malfacilaj situacioj, ĉiam ŝi diras la veron.

"Tre malbone vi edukis vian filinon!" diris al ŝi foje iu saĝulo. "La homoj toleras infanon se ĝi senindulgeme diras la veron; tamen, se ĝi, kreskinta, ne eklernas mensogi, tiam ĝi iĝos malfeliĉa dum sia tuta vivo". La malbonoj pli frue komenciĝis ol la saĝulo pensis. En la lernejo, la profesoro pri biontologio plendis al matematik-profesoro: "Mi ne povas disciplini tiujn miskonduktajn infanojn. Ili solidariĝis kaj neniam denuncias unu la alian. Kion fari?" - "Vi devas demandi nur Rosetan. Ĉiam ŝi diras la veron", respondis la matematik-profesoro.

Proksimfoje, kun bruega krakado rompiĝis la nuksoŝeloj gluitaj sub la piedoj de la seĝo, kiam la profesoro eksidis. La katedro pligrandigis eĉ eĉis la inferan bruon. La tuta klaso skuiĝis de ridaĉo. "Kiu faris tion?" ekkriis la profesoro. Granda silento. "Mi demandas, kiu metis nuksoŝelojn sub la seĝo? Ludoviko, ekstaru!" - "Mi ne scias, sinjoro profesoro." - "Roseta, ekstaru! Respondu!" Roseta staris, sed silentis. "Knabino, respondu al mia demando," kuraĝigis la profesoro. "Mi ne diros", mallaŭte sed decideme respondis la knabino. La lernantaro ekmurmuris kaj la profesoro ruĝiĝis. "Kial vi ne diros?" "Ĉar tiam, denove, ne parolos al mi miaj kunuloj." La klaso komencis danĝere muĝi en senkaŝa ribelo. La profesoro meditis. Se li ne disciplinas tiun ĉi knabinon, peneos lia aŭtoritateco. "Roseta, venu tien."

La knabino obeeme iris al la profesoro, renkonten al li, kiu prenis la mentonon de la lernantino en sian manon por turni ŝian vizaĝon pli supren. Li pensis, ke lia alteco ektimigos la knabinon tiel devigatan rezigni pri obstineco. Roseta vere timis. Ŝia maldika korpo tremis kaj ŝiaj grandaj brunaj okuloj pli bele brilis en la blankpala kadro de ŝia vizaĝo. "Kiel bela estas tiu ĉi knabino!" pensis Joĉjo sur la dua benko. "Post la instruo mi elprovos ĉe ŝi mian metodon!". Joĉjo estis maltimeza knabo. Li havis agrablan vizaĝon kaj liaj sukcesoj apud la knabinoj igis lin tro malfida. Li akiris rutinon en la amindumadarto kaj nur malmultaj knabinoj rifuzis la kisetojn de li post aplikado de liaj metodoj. "Roseta, pripensu grave," diris la profesoro. "Iu metis nuksoŝelojn sub mia seĝo. Tio estas malkorekteco, kiu perturbas la lernadon.

MENSOGO


Tamen ne granda peko, al kiu respondos ne granda puno, sed vi grave pekos se, scianta pri la kulpanto, vi obstine kaŝas la veron kontraŭ mi, kontraŭ la lerneja disciplino. Plej impertinenta vi estas, se vi volas neniigi mian aŭtoritaton. Ĉu vi scias kiamaniere mi povas mallaŭdi al tia konduto?". - "Mi ne volas neniigi vian aŭtoritaton, sinjoro profesoro. Sed mi ne diros, kiu estas la kulpulo; se mi diros, ĉiuj primokos min kiel denunciintino." La profesoro ekprenis la manon de la knabino: "Tuj venu kun mi al la direktoro!" Joĉjo ekkompatis Rosetan, stariĝis kaj diris: "Sinjoro profesoro, mi estas la kulpulo." La profesoro liberlasis Rosetan kaj petis la kontrollibreton de Joĉjo.

Dum la paŭzo Roseta mire demandis Joĉjon: "Kial vi surprenis la kulpon? Ankaŭ vi scias, ke Roberto faris tion." - "Tio estas longa historio. Post la instruo, mi akompanos vin kaj rakontos".

La metodo de Joĉjo denove sukcesis. Tiel sukcesis, ke Roseta du horojn malfruadis. "Kie vi estis?" demandis la patrino, kiam la filino fine revenis hejmen. "Knabino malsaniĝis kaj mankis en la manpilkoteamo. Oni petis min anstataŭi ŝin ĉar estis serioza maĉo", respondis Roseta, ruĝvizaĝe. "Kial vi tiom ruĝiĝas?". Roseta surpriziĝis; ŝi opiniis, ke vere malfacile oni povas mensogi. "Patrino, mi mensogis. Mi babilis kun knabo." "Kion faris al vi tiu knabo?" - "Nenion. Fine li volis kisi min, sed mi forkuris." "Mia filino mensogis! Dank'al Dio vi ne iĝos malfeliĉa. De nun vi ne plu estas infano, sed virino. Tamen vi devos plulerni, ĉar tiu mensogo estis tre mallerta!".


"Sed la dua bone sukcesis!" pensis Roseta, kiu foje silentis. Ŝi turnis la kapon, malfermis siajn belajn okulojn, kaj ridetis ĉar ŝi rememoris pri la unuaj kisoj.

Ladislav Tihanyi



POR VIA DISTRO

NOVA PROBLEMO



Vertikale-

- 1- Sufiĉe manĝinta.
- 2- Skribmaterialo.
- 3- Valorpapero (nur radiko).
- 4- Marĉa birdo longkrura (n.r.).
- 5- Provizi per bataliloj.
- 6- Poseda pronomo.
- 7- Historia temp-aĝo (n.r.).
- 8- Doni manĝaĵon.
- 9- Planedo.
- 10- Konstruaĵo.
- 11- Pralingvo de la Persoj.
- 12- Elmeti al danĝero.
- 13- Griza, facile fandebla metalo
- 14- Diboĉo (n.r.).
- 15- Imperativo de "esti".
- 16- Enigi pinton en ion.
- 17- Klare, senmakule.
- 18- Duona inspekto.
- 19- Lancosoldato (n.r.).
- 20- Alkohola trinkaĵo.
- 21- El Ĉinujo.
- 22- Rampbesto (n.r.).
- 23- Bruspiri dormante (n.r.).
- 24- Modera (n.r.).
- 25- Oleo-frukto (n.r.).
- 26- Korpulenta.

La kvin horizontalaj vicoj formas
la unuan leteron de komencanto.

SOLVO DE LA ANTAŬA ENIGMO :

La trovota frazo estis:

" La internacia lingvo povas aspekti
nenatura nur al la homoj, kiuj ne
regas ĝin aŭ ne scias ĝin kontentige
sed tiaspecan nenaturecon havas
ĉiu ajn lingvo, kiam ĝi estas aŭdata
aŭ legata de persono, kiu ne konas
ĝin".

52	4	140	32	161	61	3
I	N	D	E	K	S	I
17	32	101	16	47	8	
V	A	N	G	O	N	
20	37	14	56	158	103	34
O	R	I	E	N	T	A
121	163	15	89	49	79	
L	U	N	D	O	N	
97	1	130	27	109	138	145
A	L	M	E	N	A	U
134	144	50	151	107	141	
P	A	J	A	C	A	
81	28	46	118	112	172	134
E	K	H	A	V	I	S
33	18	127	83	12	114	
N	O	K	T	A	S	
92	2	74	38	168	90	102
N	A	G	A	N	T	A
143	55	110	122	152	41	149
A	N	H	I	D	R	A
57	165	85	40	43	86	
R	E	G	U	L	E	
95	59	162	19	35	106	
E	G	I	P	T	E	
135	72	124	30	131	136	157
T	A	G	I	G	A	S
167	34	116	39	11	36	170
O	P	I	N	I	U	S
156	42	48	98	24	108	
R	A	N	E	T	O	
84	39	108	125	58	162	
I	N	G	V	E	N	
166	155	146	51	169	119	
K	E	L	K	A	J	
158	13	133	104	54	126	
O	L	E	U	J	O	
115	71	105	77	85	139	
Ĉ	I	R	K	A	U	
92	64	30	24	66	153	123
A	N	T	A	Ŭ	E	N
26	6	120	133	117	33	
P	E	N	S	U	S	
75	31	87	31	73	5	147
I	N	S	I	S	T	E
150	68	173	60	70	111	
T	E	N	A	C	A	
7	45	67	46	63	171	128
R	A	N	C	I	Ĝ	I
160	48	9	62	129	69	
O	M	A	Ĝ	A	S	
21	113	23	142	100	10	
V	A	S	T	E	C	
132	76	25	53	44	78	
I	N	S	U	L	O	

LA VIE DE GRÉSILLON

ENTRE NOUS...



La question qui se pose à nous à cette époque de l'année est la suivante: "Comment l'été s'est-il passé?" Une réponse précise ne pourra être donnée que le 20 octobre au Conseil d'Administration. Cependant une vue d'ensemble des stages nous permet de constater que la participation a été meilleure que celle que les pronostics de juin nous faisaient craindre. En effet, si la 3ème période, à cheval sur juillet et août, s'est ressentie du Congrès de UEA, l' "après-Augsburg" a amené d'assez nombreux congressistes à faire une visite ou un séjour à Grésillon. D'autre part l'activité "informatique" a intéressé de nombreux espérantistes: il y a eu deux fois plus de participants que d'inscrits ce qui a posé des problèmes de matériel (nécessité de louer deux appareils supplémentaires au pied levé). Succès avec son revers: l'aspect "Informatiko por esperanto" a dû être un peu négligé. Les responsables en ont déjà tiré les conséquences pour l'an prochain.

L'innovation de 1984, reconduite en 1985, d'une rencontre informelle pendant les deux dernières semaines de juin a confirmé son existence grâce à un nombre de participants moyen mais un peu plus important que l'an dernier et aussi la présence de 5 nationalités différentes.

Dire que l'ambiance a allié travail, distractions et amitié n'ajoute rien aux remarques des années précédentes. Il faut cependant dire que la première période de juillet a connu un succès culturel plus grand que l'an passé avec 20 conférences faites par 10 conféren-

ciers de 5 nationalités différentes. Par contre Audrey Childs-Mee ayant été indisponible, son séminaire n'a pas pu avoir lieu. L'organisation des soirées et des excursions a été très satisfaisante. Il convient donc de remercier tous ceux, conférenciers, responsables de cours et des diverses activités, qui ont permis une fois encore à presque 300 espérantistes de passer pendant l'été un séjour agréable et enrichissant.

Au début de juillet le stage a été quelque peu perturbé par des travaux importants. Il s'est en effet révélé en juin que la réfection du système d'évacuation des eaux usées ne pouvait plus attendre. L'entrepreneur n'a pu procéder aux travaux qu'en juillet. La présence d'un bull-dozer et d'une pelle mécanique a été gênante pendant quelques jours et le paysage a été bouleversé.

Pensez déjà tous à 1986. Le programme sera à votre disposition en novembre. N'oubliez pas non plus qu'à partir d'avril jusqu'en juin, en septembre et octobre, le château peut vous accueillir avec votre groupe, espérantiste ou non, pour une visite de la région. Nous pouvons vous organiser un programme et c'est souvent là une occasion d'informer sur l'Esperanto des personnes qui en ignorent tout.

Carnet Rose

Julia Babin est heureuse d'avoir une petite soeur, Clara. Ses parents et ses grands-parents aussi bien sûr.

St Martin d'Arcé, 19-8-85

INTER NI

Ĉiujare, en septembro, staras la demando: "Kio okazis dum la somero en Gresillon?" Precizan respondon ricevos fine de oktobro la komitatanoj. Sed jam, ĝenerala rigardo permesas konstati, ke iom pli da homoj ol antaŭvidite vizitis la Esperantodomon. Kompreneble la 3-a periodo, parte en julio parte en aŭgusto, estis influita de la proksimeco de la samtempa U.K. en najbarlando. Sed multaj kongresintoj vizitis la kastelon kaj restadis pli malpli longtempe tie. Plie, la studperiodo "Informatiko" tiel bone sukcesis, ke oni estis devigata lui du pliajn aparatojn. Bedaŭrinde la tro granda nombro da "inicotoj" igis la gvidantojn ne sufiĉe atentigi la aspekton "Informatiko por Esperanto". Grava sperto por la starigo de la venontjara programo.

Kiel en 1984, ĉi-jare okazis la "Neformala dusemajna renkonto" fine de junio. Meznombra ĉeestantaro, tamen iom pli granda ol la antaŭan jaron, kaj partopreno de 5 nacioj. La unua periodo estis ankoraŭ pli kultur-riĉa ol en 1984. Estis prezentitaj 20 prelegoj de 10 prelegantoj el 5 diversaj landoj. Sed ni bedaŭris, ke Audrey Childs-Mee ne povis ĉeesti ĉar ŝia seminario ne okazis. Plezure ni dankas ĉiujn, prelegintojn, kursgvidintojn, respondintojn pri vesperaranĝoj kaj ekskursoj. Dank'al ili 300 esperantistoj travivis agrablan kaj riĉigan tempon en la Esperanto-Domo Grésillon. Jam pensu pri 1986. Petu la programon ek de novembro. Ne forgesu, ke dum la printempo kaj aŭtuno Gresillon povas akcepti grupojn da personoj, kiuj deziras viziti la regionon. Ni estas pretaj helpi ilin.

LIBRO - SERVO

ĉe S-ino VINCENT, B.P.54, 49150 BAUGÉ

Nia katalogo estas havebla kontraŭ poŝtmarko.

Pagu vian mendon prefereble post ricevo de la fakturo. Aldonu 15% por sendkostoj. Ĉekoj adresotaj al Maison Culturelle esperantiste, 49150 BAUGÉ

ATESTO pri PRAKTIKA LERNADO-

Dum la ekzameno, la kandidatoj rajtas uzi nur
LEXIQUE FONDAMENTAL de R. Léger (10 F.)

ATESTO pri KAPABLECO-

Por bone prepari tiun ekzamenon uzu la novan eldonon de
PREPARADO al la ATESTO pri KAPABLECO (30 F))

Baldaŭ aperos HISTOIRE du MOUVEMENT ESPERANTISTE en ROUSSILLON

verkis J. Amouroux, M.Th. kaj R. Lloancy prezo: 45 F.

Kaj ne forgesu POR la PRAKTIKANTOJ, "vigla lernolibro", 25 F.

niajn perkorespondajn kursojn

niajn ilustritajn bondezirajn kartojn.

GRAMATIKO PER BONHUMORO

La ADJEKTIVO ricevas KOMPLEMENTON

- I) **ADVERBA suplemento** : tro riĉa - iom stulta - horloĝe akurata.
- II) **INFINITIVA suplemento** : preta ĵuri - ne kapabla plenumi laboron.
- III) **PROPOZICIA suplemento** : ĵaluza, ke ŝi koketis al mi.
- IV) **SUBSTANTIVA suplemento**

- 1) **AKUZATIVA suplemento** :
 - parolado du horojn longa ; pakajo tri kilogramojn peza.

RIM :

- tiu akuzativa suplemento staras ANTAŭ la adjektivo.
- ĝi esprimas nur mezuron.

- 2) **PREPOZITIVA suplemento** :

JE :

- **por anstataŭi la akuzativan suplementon** :
(parolado longa JE du horoj -pakajo peza je 3 kilogramoj).
- **por montri abundon aŭ senigon** :
(riĉa je brutoj — lama je unu membro).
- **por esprimi ne precizan rilaton kun la adjektivo** :
(kapabla je ĉio — kontenta je sia sorto).

Ĉu jesi aŭ nei ?



Paĉjo, mi estas preta ĵuri, ke vi jesis al mia peto ; ĉu vi volas pruntedoni vian monujon al Karlo ? Pro truo en sia poŝo li perdis liajn monbiletojn. Tamen hodiaŭ vespere, ni multe deziras viziti la tre bela nova kabareto. Estu certa, ke li redonos la monujon al vi morgaŭ matene, kiam ni revenos.

ALIAJ PREPOZICIOJ : (AL — DE — KUN — POR — PRI — KONTRAŭ) :

- surda al ia peto — ebria de ĝojo — tro familiara kun la najbaroj.
- blinda pri siaj infanoj — preta por la laboro — imuna kontraŭ la fajro.

Ĉu ĵaluza al li ?



— Doris, ŝajnas, ke ni devas trovi profesoron pri pian-ludado. Mi pensas, ke ĉiutaga leciono unu horon kaj duono longa estas necesa por nia filo. Tiamaniere, li rapide ĉesos rompi al ni la oreloj.

— Ho ! Fi al vi Gustavo ! Vidu kiel majstra li jam estas pri pianludado ! Tamen ŝajnas al mi, ke, profite al ĉiuj, leciono longa je duonhoron sufiĉos !

Kiom obstina kontraŭ ni !



Kia bela fiŝado ! Vere de longa tempo li sidas ĉi tie ! ĉu li estas blinda ? ĉu li kredas ni tiom stultaj por loĝi ĉi tie ? Certes li estas nova loĝantoj ; se ne, li scius, ke tiu loko estas la ĉefa rubejo por la ĉi-tiea loĝantoj.

jesos — siajn — belan novan kabareton.
duonon — orelojn — duonhoron.
nin — loĝanto — ĉi-tieaj.

KOREKTOJ

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse, 2, LINZ (200 aŭstr. ŝil.).

Belgujo : S-ro Guyot Mateo, 12, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (400 fr.).

Britujo : S-ro K. Mac Lennan, 30 Lower King's Avenue — **Exeter**, EX 4 6 JT (5,00 pundoj).

Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (75 kr.).

Finnlando : Libra Mendoservo Esperanta, kivistöntie, 05510 Hyvinkää 51 (50 mk).

Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk. Frankfurt (M) 2347 59-601 (25 mk.).

Hispanujo : S-ro Francisco Sanchez Anton, Avda Salamanca 10-10° - D ALICANTE - (1 100 pes.).

Israelo : Adrian Boldan, Merkaz Klitah, ATLIT (12 us. dol.).

Japanujo : S-ro Tara Niŝiumi, section Seiyoshi, ĉhuo-Universitato, 742 Higaŝi-Nakano, Hatiôzi-ŝi TOKYO-TO, J-192.03 (2500 jenoj).

Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (12 U.S. dol.).

Nederlando : S-ro M. de Waard, Aurorastraat, 4, 5631 KK EINDHOVEN, pĉk. 209721 (24 gld.).

Norvegujo : S-ino Louise Bøe Marmarv 2A Oslo 11 (55 kr.).

Pollando : Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO (12 us. dol.).

Svedujo : Sveda Esperanto-Federacio Brunnsgatan 21, S. 11138 Stockholm poŝtkonto : 20123 (60 kr.).

Svislando : Kultura Centro Esperantista poŝtfako 771. LA CHAUX-DE-FONDS - p.k. : 23-2921 La Chaux-de-Fonds (22 frs).

Usono : S-ro Bern Wheel, Books, 834 Wenonah, Oak Park IL 60 304 (12 us. dol.).

Aliaj landoj : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj : abonprezo : 12 us. dol. aŭ 25 internaciaj respondkuponoj.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ

Maine-et-Loire

FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De julio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
 Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon .
 Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
 Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
 Por studi specialajn problemojn ;
 Por inter amikoj gaje libertempi ;
 Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

venu al la esperantista kulturdomo

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkuponon al :
 ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo.